
# HEJS

JUNULA SEKCIO

Nº 69

REDAKTORINO
CARMEN-NAVARRO

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO



# CERBUMAĈADOJ
# DE
# NAZIH

## LASTAJ NOVAĴOJ PRI NIA NACIA KONGRESO

Lasthore ni ricevis en la Redaktejo de HEJS afablan leteron de la LKK de la XXXIª Kongreso en Alicante plenumante nian peton pri serĉado de juna restadejo, kampadejo aú io simila kie la junaj partoprenantoj de la Kongreso povus loĝi per malalta prezo.

Jen liaj informoj pri kostoj en la bela kampadejo en urbeto Albufera je 5 km. de distanco. Ĉiu 20 minutoj pasas ls buso al Alicante.

Pro tiuj kiuj portas propan tendon:

1 - 18 Ptoj . ĉiutage po persono
2 - 16 " por la rajto instali tendon
3 - 16 " permeso lasi veturilon

Por tiu kiu ne portas tendon:

Laú numero 1 - 20 Ptoj.
" " 2 - 20 "
" " 3 - 20 "

Ekzistas tendoj po 30 Ptoj. ĉiu persono, kun loĝebleco por 4 personoj. En la unua kazo kongresantoj ĝuos rabaton de 20%; en la dua la rabato estas 10%. Ekzistas du kampadejoj, unu ĉe la strando kaj la alia je 200 m.

La LKK tre bone laboradas por la sukceso de la kongreso kaj ili estas tre interesitaj por ke ĝi estu tre alloga por la gejunuloj kaj ili preparas, ekzemple: junan tagon dun kiu ni interkonos kaj diskutos pri niaj aferoj, ankaû ni havos balon kaj "atentu": la urbestro de Benidorm ĝentile preparas por la kongresanoj simpatian taúroludeton.

Kiel vi povas rimarki la Kongreso estos tre gaja. Do, ni instigas al vi ĉiuj ĉeestu la XXXIan Kongreson de Alicante.

H.E.J.S.

## PLENUMANTE ORDONON

Iu sciigis al mia ĉefredaktorino ke mi ĉeestos estontan UEA-Kongreson en Londono. Pro tio ŝi "ordonis" ke mi skribu artikolon pri miaj personaj impresoj rilate tiun vojaĝon. Kion mi povus raporti al vi pri tiu temo? Sed, ĉar mi ne kuraĝas malobei mian estrinon mi klopodos klarigi al vi iom pri tiu temo.

Antaŭ kelke da monatoj mi ne sentis emon fari tiun vojaĝon, ĝi ne allogis al mi, sed kiam mi sciis ke multe da gejunuloj de mia urbo ĉeestos la kongreson tiam mi ekplanis mian partoprenon. Ĝis nun jam aliĝis dek kvar Bilbao´aj gesamideanoj, el kiuj dek estas belaj kaj simpatiaj junulinoj, ĉu mi ne profitus tia ĉarman akompanaron?

Krom tio japana korespondantino mia sciigis al mi ke ŝi certe ĉeestos Londonon, ankaŭ mi havos okazon renkontiĝi kun aliaj eksterlandaj geamikoj kun kiuj mi interkonatiĝis dum mia feliĉa partopreno en la UEA-Kongreso sukcesinta en la hispana ĉefurbo Madrido.

Mi ne konas Londonon sed mi multege aŭdis kaj vidis pri tiu urbego pere de filmoj. Krom la plej vizitindaj monumentoj: La Londona Turo; Katedralo de Stª. Paulo; La abatejo de Westminster; Palaco de Buckingham; "vaksa muzeo" de Madame Tussaud´s k.t.p., mi intencas viziti junularan diskotekdancejon pro "travivi" la veran etoson de la plej moderna movlertamuziko, de kiu, laŭ mia opinio Anglujo estas la naskiĝloko.

Post la UEA-Kongreso mi tre sopiras ĉeesti la 27ª Internacian Junularan Kongreson okazontan en Edinburg (Skotlando). Kelke da gejunuloj el Bilbao sciigis al mi ke ili ankaŭ ŝatos partopreni tiun junularan renkontiĝon.

Finante, mi esperas ke mia ĉefredaktorino ŝatos ĉi-tiun artikolon kaj ŝi rajtigos ĝian aperigon en nia H.E.J.S. kontaktilo. Eble post mia reveno el Anglujo mi devos raporti al vi miajn impresojn pri tiu lando.

Ĝis estonta okazo.

MIKAELO

# ESPERANTISTA MOVADO

De ĉiam mi trovis la saman problemon en la esperantista movado. Esperanto estas utilega aĵo (pardonu al mi ĝin nomi tiel), mi ĝis sportis persone. Do, mi ne dubas pri ĝi.

Sed ankaŭ mi notis kiom da malfacilaĵoj oni povas havi por ĝin lerni. Mi konas multajn personojn, kiuj oferis kaj oferos sian tempon kaj intereson - kaj inkluzive sian ekonomian intereson al konataj personoj, amikoj aŭ al labor-kunuloj. Kion ili estas atingintaj?

Multfoje, nur ke ili akceptu esperanton nur pro via insistado, aŭ ĉar ili ĝojas dum momentoj kaj - ĉio estas same por ili. Rezulto: ke konvinkita esperantisto perdas iom da sia intereso pri esperanto kaj suferas seniluziiĝon, ĉar li notas kiel siaj penoj estas vantaj.

Do, kiujn ni ne bezonas? Ni ne bezonas nek deziras fierecajn egoistajn "viglaĉajn" personojn, nek ekspluatantojn de homaro el iu ajn el la multnombraj faktoj, kiuj estas en la mondo.

Ĉu ni agadas bone? Estas malfacile scii ĝin, sed ne estas dubo ke nia propaganda spirito devas ŝanĝiĝi. Nenian Esperanto devas esti nur la materiala fakto paroli lingvon por kiuj la personoj interkompreniĝas.

Esperanto devus konduki nin ĝis vivmaniero en - kiu la homaro komprenante unu la alian, estus pli bona.

Ni devas havi orgojlon esti esperantistoj. Kiom da personoj estas orgojlaj pri aliaj malgravaj aĵoj), kaj nenian ni devus humiliĝi ĝis [illegible]ozi la partoprenon de personoj, kiujn ni ne bezonas nek deziras. Tiaj personoj nur povus alporti al ni malutilon.

GABRIEL

## D A M A S K O

Iun matenon de la pasinta Decembro, mi promenis tra la stratoj de Damasko. Spirante tiun puran aeron, mi ĉirkaŭrigardis kaj ĉio estis tiel bela ke mi forgesis miajn farotaĵojn kaj mi daŭris promenanta kaj rigardanta atente tiun senegalan belaĵon. Mi rememoris ke, iu, vidante Damasko-n diris: se vere ekzistas gloro, se vere ekzistas majstra verko de Dio, Damasko estas vere tiu gloro kaj majstra verko.

No, kiu tion diris, tiu ne trograndigis, kaj ŝajnis al mi ke ne ĉio estis dirinte. Verdaj stratoj plenaj je floroj kaj arboj, blua pura ĉielo.

Same kiel ĉiu urbo, Damasko enhavas sian antikvan parton kaj sian modernan parton; sufiĉas diri ke Damasko estas la plej antikva urbo el la mondo kaj ĝia tuta antikveco estas perfekte esprimita en sia strathalo, kiu enkondukas en unu el la mondaj mirindaĵoj, la antikva moskeo.

Tie, en la strathalo, oni povas trovi ĉion deziritan, brokaton de Damasko kaj la plej estimatajn teksaĵojn, pacon kaj trankvilecon, ĉar eĉ aŭtomobiloj ne ekzistas.

En la moderna parto, kiel en ĉiu nova urbo, troviĝas altaj konstruaĵoj, vigla trafiko, larĝaj -- stratoj ornamitaj de floroj kaj arboj; ĝia rivero Barada kun siaj puraj akvoj kaj, por unu vorto, Damasko estas kiel dirite en "milo kaj unu noktoj" - milo kaj fojo pli bela kaj alloga.

N A Z H O



# INTERVJUO

Ni havis opini-interŝanĝon kun JOSE FARIÑAS, Prezidanto de HEJS, de kiam tiu-ĉi Junulara Sekcio havas sian sidejon en Bilbao.

Nun vi estas la nova Prezidanto de HEJS, ĉu vi ricevis kun iluzio tiun-ĉi postenon?

Kun grandega iluzio ĉar mi min sentas tute ligita al Esperanto kaj ĝia movado, sendube restas al mi multaj horoj el mia libera tempo, sed mi estas konvinkita ke Esperanto ĝin meritas.

Kiajn aktivaĵojn nun vi havas?

Ĝis nun la estraranoj de HEJS ne estas sufiĉe orientigitaj, sed ni jam kontaktis kun ĉiuj grupoj en Hispanio, instigante ĉiujn junajn esperantistojn, kunlabori kun ni por senti nin pli ligitaj.

Kaj pri la revuo?

Kiel vi scias, ni estas laborantaj kun grandega entuziasmo. Ni deziras doni al ĝi novan aspekton pli junan kaj allogan; la unua numero estis por ni sufiĉe malfacila, precipe pro nia nesperto pri io simila, sed de nun, ni fidas ke ĉio rezultos pli bone.

Ĉi-jare okazos du kongresoj, la universala en Londono kaj nia nacia en Alicante, ĉu vi ĉeestos iun el ili?

Eble ambaŭ, kaj pri tiu-ĉi temo, pri la Kongresoj, mi volas sciigi ke ni intencas atingi ke tiu-ĉi jaro en Alicante oni enmetu en la kongresprogramon Interkonan Junularan Vesperon. Mi opinias ke tio donus alian etoson al la kongreso kaj ĝi estus pli alloga, por la gejunuloj. Ĝis nun la ĉeesto de gejunuloj en niaj kongresoj estis tro malgranda, sed ni certas ke H.E.F. helpos nin tiel entuziasme kiel ni laboras por atingi ke la proksimajn kongresojn ĉeestos pli da juna esperantistoj.

Ĉu vi pensas ke la junularo sin interesas pri Esperanto?

Ĉiujare preskaŭ en ĉiuj hispanaj grupoj, oni - donas novajn kursojn de nia Internacia Lingvo, kiuj ĉeestas multaj gejunuloj, multaj malpli ol ni - dezirus, sed feliĉe ili ĉeestas. Ili tion faras, - eble pro scivolemo, aŭ ĉar ili vere rimarkas la -- grandan avantaĝon kiu estus por la Homaro, la Internacia Lingvo Esperanto.

Kion oferas Esperanto al la junularo?

Al la junularo Esperanto oferas ĉion. Esperanto kaj ĝiaj idealoj perfekte kunsentas kun la pens-maniero de la nuntempa junularo. Esperanto estas la - juna lingvo por la junaj homoj. Mi ne dubas ke la gejunuloj havas klaran senton de komunikeco kaj unueco kaj la deziro, kiel diras tiu kanzono, fari "nova mondon" kaj en tio la Internacia Lingvo, ludas tre gravan rolon.

Kaj finfine kion vi dirus al la junaj esperantistoj?

Nur ke ili daŭrigu kun granda entuziasmo pri - Esperanto kaj ke ili disvastigu inter ĉiuj gejunuloj kiujn ili konas, tiun-ĉi ideon plena da humanismo kaj amo, kiu estas Esperanto.

MEYKO

O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O-O

## DEZIRAS KORESPONDI

CARMEN DOLORES DELGADO RUIZ
Bº La Candelaria
c/. 26 de Diciembre, 19
La Cuesta (TENERIFE CANARIAS)

RENÉ VALDÉS
Pasaje General Lee,6
La Habana-5 CUBA

## PALINURO REVENU!!




Iu kuiristo sekvata de sia hundo eniras fiŝvendejon. Li eksploras kelkajn palinurojn kaj demandas ĉu ili estas freŝaj?

-Ho! Ĵus kaptitaj! Jes -respondas la vendisto- Rimarku ili estas vivaj!

-Ĉu vivaj?

-Jes. Ĉu vi ne kredas? Metu vian fingron inter la preniloj en iun ajn.

-Hum. Ne, tio ne, se ili estas vivaj, ili povas min dolorigi.

-Bone, tiam provu per la vosto de via hundo.

Oni faras provon. La kuiristo prenas la voston, metas ĝin en la korbon kie estas la palinuroj, ĝin agitante.

Unu el ili furioze kaptas la voston kaj la hundo laŭtege blekante pro doloro, forkuras rapidege portante alkroĉita la atakantan palinuron.

-Voku vian hundon! petegas la vendisto.

-Ĉu mi? Voku vi vian palinuron -respondas la alia, kaj eliras serioze kaj digneco.

MIKAELO



# LA NOVA MODO



Alvenis printempo kaj la junularo plezure demetis la vintrajn vestojn.

Sed jen nia surprizo vidante ke sub la maxisurtutoj kasiĝis ĉarmaj "mini-shorts".

Mi agnoskas, ke mi konsideris tiun modon fiaskonta, speciale vidinte la anglajn statistikojn, Tamen, mi devas nun atesti ke la bilbaoaj junulinoj jam adoptis la "pantaloneton", almenaŭ, mi supozas, ĝis la fino de la somero.

Komprenemble, tiu-ĉi modo, kvankam simpatia kaj kuraĝa, povas esti adoptita nur de eta minoritato, ĉar kontraŭe ĝi fariĝus ridinda.


Mi fidas je la bona senco kaj eleganteco de la bilbaoa junulinaro por gracie porti la novan modon.


Tamen, nia plej granda surprizo estis la modo - de la surŝultra mansako por junuloj. Mi ĉiam kredis ke la kialo de la mansako estis la nedisigeblaj "amikoj" de la virina koketeco; pudroj, lipfarbo, par funo....

Ĉu tiaj elementoj fariĝis nuntempe intimaj amikoj de la viroj?


Sur la hodiaŭa modo pendas ĉi tiu kaj aliaj interesaj demandoj.

Same tiel en grava bilbaoa magazeno, ni devas - ĝin nomi "Libera Modo", ĉar tiu estas la plej ample ksa kaj oportuna nomo, ĉu ne?





VIOLETA



## LA KANARIAJ INSULOJ

Antaŭ multaj jaroj la Kanariaj Insuloj estis nomitaj "Bonsorta Insularo". Sro. Juba estis la unua persono kiu uzis la vorton "Kanariaj" por ilin nomi.

Oni diras, ke la antikvaj insulanoj ĵetis arojn da hundoj kontraŭ la malamikoj kiuj invadis la landon.


La kanariaj homoj ĉiam havas boran humoron; plie, ili estas noblaj kaj agrablaj, same kiel sia regiono. Tamen, ĉiam ili sciis ĝin defendi eĉ ĝis la heroeco.


Nelson, la angla admiralo, estis tie venkita kaj li perdis sian brakon kiam-li atakis la pacan kaj ridetantan Tenerifon.

La alteco de la Tejdo, 3711 metroj, kun blanka neĝo sur la pinto; la verda valo "Orotava", kaj ĉia-klasaj floroj - en la insulo transformas ĝin al la plej bela loko en la mondo.


Kanariaj Insuloj...! Ĝardeno de la Atlantiko, mi neniam forgesos vin!

ICIAR





PRINTEMPO




Pluvo, tondroj, hajlo, malvarmo kaj vento; finfine Printempo, post preskaújara atendado, kvazaú timema junulineto, alvenis. Ĝi estas ĉie, ĉe la burĝono de la arboj, ĉe la animo de la maljunuloj, en la infanaro kaj inter la amindusmistoj, kiuj simile al sportaj ĉasistoj atendas sian flirtan sezonon.


La kamparo, ricevante Printempon, vekiĝas el sia letargio, la vegetaĵoj kreskas, naskiĝas la bestoj, kaj la ekskursantoj ŝarĝantaj siajn dorsakojn, anstataú ĝui kamparon, prenas sur sin la taskon ĝin difekti.

En la urboj, la "infaninoj" pretiĝas al la granda sonera batalo kaj ili, kun helpo de siaj patrinoj, trovos fianĉon, kiu finiĝos, same kiel sonĝe, ĉe komenco de aútuno.

Kaj tiel, preskaú sen rimarko, Printempo estas alveninta.

MORALAĴO: Printempo estas en ni mem kaj ne en la televida "veter-viro".






ROSALIA





# POR VI......

Kvankam tiu ĉi revuo estas prefere legita de junuloj, mi volas speciale dediĉi mian artikoleton al malnovaj esperantistoj, ĉar mi scias ke ankaŭ multaj el ili legas ĝin.

Unue mi volas tutkore danki al vi "niaj karaj -- malnovaj samideanoj" pro via sindonema kaj senlaca laborado; dank'al ĝi nun ni estas ĉi tie. Vi povas esti fieraj ĉar certe, via semo estis fruktodona -- kaj nun alvenas la tempo por pruvi al vi ke efektive ĝi estis tiel.

Sed pro tio, ni bezonas vian tutan apogon kaj komprenemon; estas fakte ke multfoje ni pekas kiel - tro optimistaj, al ni mankas via sperto, kiun oni - nur akiras iom post iom, sed ankaŭ vi devas agnoski ke la junularo estas la bazo de la estonteco kaj ke en tiu proksima estonteco la destinoj de la mondo estas je niaj manoj, tial ni rajtas "krei" nian mondon.

Mi deziras atentigi al tiuj iomete reakciuloj - kontraŭ la agado de la junularo, memoru ke ankaŭ - vi estis junuloj kaj ankaŭ vi postulis kion nun ni postulas.

Ĉiu generacio alportas bonon kaj malbonon, do, se ni ne agas efektive ni ne eraros sed ankaŭ ni - ne daŭrigos la progreson.

Ni la junuloj deziras kaj povas pruvi ke ni kapablas fari gravajn aferojn, krom porti longajn harojn aŭ mini-jupon.

MARI JOSE

## INTERNACIA FESTIVALO DE TEATRO

La internacia festivalo de teatro en Nancy estas - la plej grava artkonkurso por sendependaj grupoj. Ĝi okazos de la 24ª de Aprilo al la 4ª de Majo en Nancy kompreneble, kaj ĝi, rilate al la diletantoj, kaj -- precipe al kiu emas la antaŭgvardian teatron, meritas la penon.


Hispanio, aŭ pli bone dirante, la malkvieteco de - la hispana junularo, estos reprezentata de la "Teatro Estudio Lebrijano" kiu alportos "Oratorio-n", verko - de Alfonso Jimenez (premio Delfeno).


Verŝajne, ĝi estas eksterordinara spektaklo neatendita kaj plena je popolaj gustobatoj. "Teatro Estudio Lebrijano" gajnis la admiron de konata teatro-prelegisto José Monleón "Unua Akto".

Monleón parolis al Michele Kokossowsky, delegito - en la festivalo, kaj tiel naskiĝis invito ke tiuj ĉi seviljanoj reprezentu nian landon en Nancy.

Kaj, kun la varmo de internaciaj aplaŭdoj ĵus ricevitaj, ili venos al Bilbao por oferi al ni tiun "Oratorio-n" de la 12ª al 15ª de Majo. Ankaŭ en tiuj tagoj men alvenos al nia urbo la madrida grupo "Nuevo Mundo" (Nova Mondo) gvidita de Jorge Díaz; la grupo ORAIN de San Sebastian kaj, tre eble, la kataluna -- grupo kiun direktas ADRIAGUAL.

Ni gratulu nin, ĉar ni ĝuos teatron, bonan antaŭgvardian teatron. La organizantoj estas aro da universitataj studentoj, entreprenemaj kaj kuraĝaj, kiuj celas belan floran majon kaj ....... T e a t r a n.





CARMEN

## KURIOZA MONDO

Iu ajn, kiam ne urĝas, povas pasigi la tempon rigardante montrofenestrojn. En ili eblas trovi - kuriozaĵojn. Ekzemple, mi mem, antaŭ kelkaj semajnoj, legis en artpreparita afiŝo la jenan anoncon:

"Fraulo, 46-jara, dezirus koni agrablan inon celantan geedziĝon".

Kurioza anonco, ĉu ne?


Sed la afiŝo ne klarigis la kvalitojn de la anoncanto, alimaniere, ĝi estus pli interesanta - al la eblaj kandidatinoj.

Atentu! tiu fraŭlo estas homo kun ekterordinaraj muskoloj kaj pro tio li kapablas elnodigi - feran stangon kaj levi dek homojn sur tablo.

Ĉu vi opinias same?

Alie, laŭ posta sciigo, oni postulas specialajn ecojn al la estonta edzino; legu ilin: pli - juna ol 35-jara, mildeco, afableco, ŝi estu bonhumora kaj plie, ŝi aspektu fizike bonkonstruita.

Mi devas aldoni ke tiu gracia, suferema kaj sendefenda sinjoro loĝas en belega urbo de nia kara Europo, kaj mi demandas...... fraŭlino, ĉu li interesas vin?



C

MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares,
billarines, etc.

instalación sin
ningún gasto para
el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Teléf. 230 29 41
BARCELONA

VENDO RETALES

*para falda o pantalón*
*directos de fábrica*

*J. Cardellach*

C. Salvatierra, 99
TARRASA